


# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

<http://www.satesperanto.org/> \*\*\* retadreso: [satesperanto@free.fr](mailto:satesperanto@free.fr)



Cultivons la paix

[www.salon-initiativesdepaix.org](http://www.salon-initiativesdepaix.org)

2-3-4 JUIN 2006

2<sup>e</sup> Salon international  
des Initiatives de Paix

2-A INTERNACIA SALONO POR PACO  
P.98 KAJ 111

Julio 2006 77-a jaro, n-ro 7 (1213)

MENSUEL / MONATA

ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €



SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

# ESPERANTO EN LA DUA SALONO POR LA PACO

En 1998 ĉiuj Nobel premiitoj sukcesis ke Uniĝintaj Nacioj deklaru la tiaman venontan jardekon (inter 2001 kaj 2010) "la Jardeko por la Paco kaj Edukado al Neperforto".

por la Paco, dank'al helpo de diversaj esperantparolantoj de la pariza regiono.

Ĉi jare, samkiel en 2004, ni kaptis eblecon partopreni la duan salonon.

Ĝi okazis la 2an, 3an, kaj 4an de junio 2006 en Parizo

Ĉi-foje, pli nombraj, ni agadis diversloke dum la tri tagoj.



Foto Henri Masson SAT-Amikaro

Ĉe la Esperanto-budo daŭre estis vizitantoj. Laurent Vignaud senlace varbadis.

Pli kaj pli aktuala temo, ĉu ne? Kaj ĉiama esperantista temo.

Kadre de tiu "Jardeko" la franca asociaro, "Coordination française pour la decennie": <http://www.decennie.org> prizorgis diversajn agadojn lokajn kaj naciajn. Ekzemple: jam en 2004 ĝi starigis la unuan salonon pri iniciatoj por la paco kaj neperforta edukado.

Do, ekde 2004, por certigi ĉeeston de nia kara lingvo, kaj kompreneble de ties interna ideo, kiu taŭgegas kun la UN-a alvoko,

## 1) EKSPOZICIO

Estis deĵoranto je la dispono de la vizitantoj; tiuj lastaj, sufiĉe nombraj, alvenis post kontakto kun nia budo aŭ post legado de niaj flugfolioj disdonataj pogrande. Tio certigas nin pri neceso starigi ne nur kutiman budon sed ankaŭ apartan, komplementan lokon kie varbatoj povas pripensi mem niajn proponojn.

Kompreneble ankaŭ venis tradiciaj oponantoj al kiuj ni rebatis same

tradicie.

## 2) BUDO -

Ĉi-tie ni prezentis la movadojn, la lingvon sed plie ni montris kiel kaj kiel Esperanto povas esti montrata kiel pacilo kaj praktika edukilo al neperforto: ne facila tasko ĉar oni diris al ni, prave, ke paroli saman

lingvon, certe, povas esti unua paŝo sed ne sufiĉa: historio multfoje montris tion!

Ni disdonis inter aliaj paperaĵoj, du flugfoliojn preparitajn por tiu aranĝo.

Malgranda "libro servo" estis pli logaĵo ol vendaĵo. Alia tre interesa logaĵo estis septo de la budo tutkovrita per fotoj kaj kuraĝigoj alvenintaj el Esperantio. Inter elstaraj vizitantoj, ni akceptis ĝoje katolikan episkopon, nun momente apartigita de Eklezio pro tro da proksimeco al la subpremataj popolaj tavoloj ( Monsinjoro Gaillot) !! Sro Henriko Masson dediĉis al li sian verkon "La homo kiu defiis Babelon". Simpatiajn kontaktojn ni spertis kun najbaraj asocioj; sed multe da laboro necesas por starigi eventualan kunlaboradon; tamen ni sentis ke tiuj "paclaboristoj" bone komprenas nin kaj reciproke.

## 3) FILMO.

Emmanuel Debanne (aktivulo de Eŭropo



Foto Henri Masson SAT-Amikaro


Monsinjoro Gaillot (siatempo maldungita de la Papo) vizitas nian standon

Demokratio Esperanto) kaj Sro François Lo Jacomo (akademiano) preparis tutnovan filmeton kiu montras prelegojn el "Kunsido pri plurlingvismo de 2006". Rimarkindas nome ke temas pri tiu sindikatisto kiu ekribelas kontraŭ devigo paroli la anglan inter francoj sine de franca firmao (notu ke aktuala proceso pravigas lin). Kun la ĉeestantoj sekvis malgranda debato.

## 4) INTERNACIA KUNSIDO laborlingvo : ESPERANTO !

Responsuloj de la "Salono" antaŭvidis

Fino, paĝo 111



Nia vizitanto ricevas librojn, dediĉitaj de Sro Gueguen kaj de K-do Henri Masson, verkinto de : "La homo kiu defiis Babelon"

SAT-Amikaro aliĝis al tiu asociaro. Plie, oni starigis budon ene de tiu Unua Salono

Karaj gekamaradoj, tiun ĉi fojon por mi estas aparte malfacile verki tiun ĉi rubrikon. Mi sentas min kulpa, ke mi atendas de SAT pagon pro mia laboro. Evidente ke mi preferus povi volontule (senpage) labori por nia Asocio. Tamen, tio ne eblas ĉar mi havas familion por nutri kaj pro la malbonega sanstato de mia edzino, mia salajro estas la sola per kiu ni devas vivi.



Do, pro tio la PK decidis informi vin pri la aktuala financa situacio de SAT kaj eventualeco maldungi min. En tiu kazo mia familia situacio estos tre malfacila kaj krome, mi ne plu rajtos labori por SAT, kio provokos problemojn ankaŭ al SAT (almenaŭ momentajn). Ĉu ni trovas la solvon por ke mi povu emeritiĝi en marto 2009? Poste, se mi vivos, mi certe volontule laboros por la bono de SAT kaj de Laborista E-Movado. Eble ni trovos la solvon danke al vi, SAT-anoj. Ĉu mi rajtas esperi?

Kamaradece al ĉiuj,

via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesperanto@free.fr.

TTT-paĝoj: <http://satesperanto.free.fr>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registriilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: **satx-s**

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin, Viola, C. Orsingher, Snajpero, I. Močilnik kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro: Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.



Imprimé par: TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER

Abonnement annuel/jara abono France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

N° CPPAP 0510 G 86567

Limdato por ricevo de kontribuoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

## GRAVEGE - AL NIAJ MEMBROJ

### ĈU LABORISTA SAT DEVOS MALDUNGI SIAN SOLAN LABORISTON?

Karaj gekamaradoj,

tiun ĉi fojon la PK turnas sin al vi pro **grava problemo**. Nia ĝenerala sekretario kaj ĉefredaktoro de Sennaciulo, k-do Barkoviĉ, devus emeritiĝi la 1-an de marto 2009 por havi plenan pension. Pro la faktoj ke ni perdis multajn membrojn kaj ne alvenas sufiĉe da novaj, krome niaj libroj malbone vendiĝas, nia financa situacio iĝis tre malbona. **Tio signifas ke ni ne plu povos pagi nian solan laboriston. Kion fari? Ĉu ni devos maldungi lin?** Por nia laborista asocio tio certe ne estas akceptebla solvo. Estas klare, ke post la emeritiĝo de nia kamarado, SAT ne plu povos havi pagatan oficiston kaj devos komplete reorganiziĝi por funkcii nur surbaze de volontula laboro. Sed, ni dezirus tamen ebligi al nia kamarado labori ĝis sia 65-a jaraĝo kaj normale emeritiĝi. **Ni petas vin ĉiujn helpi nin en tio per mondonacoj, almenaŭ tiuj kiuj povas helpi.** Ni restu solidaraj kun nia sola laboristo. Do, ni malfermas apartan konton por tiu celo al kiu, ĉiu kiu povas, bonvolu sendi sian subtenon. Ja, post sia emeritiĝo nia kamarado promesas daŭre helpi volontule al la bonfarto de nia Laborista Asocio. Anticipan dankon al ĉiuj.

La Plenum-Komitato de SAT

**VARBU NOVAJN MEMBROJN AL S.A.T.!**  
**KUNLABORU EN SENNACIULO KAJ AKTIVU**  
**ĜENERALE EN VIA ASOCIO !**  
**PAGU VIAN KOTIZON AKURATE !**